HF100LZ funkcias

HF100LZ estas speciala okaza signo de amatora radiostacio funkcianta ĉe kurtaj ondoj, ekz. 80 m, 40 m, 20 m aŭ 15 m. La stacio inaŭguris sian ĉeeston en la etero okaze de la 100-a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof kaj la unuan konekton oni faris la 12-an de majo 2017 dum la 36-a Pola Esperanto-Kongreso okazanta en Bjalistoko. Temis pri konekto kun la stacio HG0WFF el Hungario.

Pri kio radioamatoroj parolas kaj en kiu lingvo? Ĉu ankaŭ en Esperanto?

Loke oni parolas en sia nacia lingvo. Poloj parolas inter si en la pola, germanoj en la germana, hispanoj en la hispana. En internaciaj interparoloj oni uzas ĉefe la anglan. En la etero aŭdeblas ankaŭ Esperanto. Ja ekzistas Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj. Ili regule renkontiĝas kaj dum la renkontiĝoj uzas nur Esperanton. La stacio HF100LZ konektiĝas kun tiuj radioamatoroj, kiuj sin anoncas, sendepende de la lingvo, kiun ili uzas. Unu el plej interesaj konektoj estis kun la stacio UA9YHA, kun Viktor el la urbo Altai en la Fora Oriento de Rusio (5640 km laŭ rekta linio el Bjalistoko). Viktor lernis Esperanton antaŭ longa tempo, tamen nur nun havis la ŝancon paroli kun iu, kaj ja el Bjalistoko, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. La parolado estis sufiĉe longa, Viktor ne kaŝis ĝojon kaj memsperte konvinkiĝis, ke Esperanto estas elstara internacia lingvo.

Alando, Jordanio, Finnlando...

Ankaŭ interesa estis konekto kun japano (OJ0O), kiu laboris en Alando. Dum semajno li faris 17 000 QSO (konektojn). Okaze de la renkontiĝo kun la stacio HF100LZ la japano ek-sciis unuafoje pri la ekzisto de la internacia lingvo Esperanto kaj promesis, ke li legos pli pri ĝi en la reto. Pri Esperanto ni parolis ankaŭ kun Muneer Saleem Naser el Jordanio, kiu membras en la asocio de reĝa radio. La unuajn Esperanto-vortojn dum la konekto lernis Roland (K3RA) kaj Nathan (N4YDY) el Usono, kaj Juha (OH6JJ) el Finnlando rakontis pri sia plantejo de tomatoj. Krom laboro li interesiĝas pri muziko kaj legas multajn librojn. Li rakontis ankaŭ, ke lia dekkelkjara filino Liris kolektas poŝtmarkojn. Juha estas certa, ke radioamatoreco kaj Esperanto helpos al li ekkoni multajn novajn amikojn, kaj la kolekto de poŝtmarkoj de la filino rapide kreskos. Ni adiaŭis unu la alian per tradicia „Ĝis la revido!". Eva (OL88Y) loĝas en Muri (Svislando). Kun amikinoj ia. el Rusio, Usono, Aŭstrio, Francio, Germanio ili kreis fortan internacian skipon de virinoj, kaj oni devas enviciĝi por povi konekti ilin. Pri Esperanto Eva eksciis unuafoje, sed ŝi promesis transdoni la informon al la koleginoj el la „virina grupo". Eble iam ni babilos en Esperanto?

Ĉiu konekto estas alia historio. En ĉiu ni parolas pri Esperanto. Kaj jen la forto de amatora radio kaj Esperanto. La stacio HF100LZ plu funkcias.

(sed, SP4FIY)

Jakobo Ŝapiro

Homo de la 100-jariĝo

Dum solena koncerto en Podlaĥia Operejo kaj Filharmonio en Bjalistoko oni aljuĝis la premion „Homo de la 100-jariĝo". La koncerto okazis pro la 100-a datreveno de re-sendependiĝo far Bjalistoko. Dum la solenaĵo oni distingis dek plej elstarajn bjalistokanojn, kiuj havis plej grandan kontribuon por la disvolviĝo de la urbo en la jaroj 1919–2019. Ili estis: Seweryn Nowakowski, Mikołaj Kawelin, Mordechaj Tenenbaum, Stanisław Bukowski, Irena Białówna, Edward Kisiel, Ryszard Kaczorowski, Jerzy Maksymiuk, Tomasz Frankowski kaj Jakobo Ŝapiro, bjalistoka ĵurnalisto, esperantisto, lernanto de Ludoviko Zamenhof.

La premion el la manoj de la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski ricevis la prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo Przemysław Wierzbowski. Jakobo Ŝapiro naskiĝis en Bjalistoko la 29-an de oktobro 1897. Ili estis la iniciatinto de la unua Esperanto-Societo en Bjalistoko, fervora propaganto de la internacia lingvo, ĵurnalisto kaj instruisto. Kiel 14-jara knabo li lernis Esperanton. Ekzamenon pri la kono de Esperanto Li trapasis antaŭ komisiono, kiun prezidis mem la kreinto de Esperanto, L. Zamenhof. La tutan plenkreskan kaj profesian vivon Ŝapiro ligis kun la lingvo. Li iniciatis ŝanĝon de la nomo de la strato Verda al Ludwika Zamenhofa.

(sed)

Intervjuo kun Viktor Lagutin, volontulo laboranta en Bjalistoka Esperanto-Societo

Iam la avino diris, ke poloj ne ŝatas rusojn...

De kie vi venis kaj kion vi faris en Bjalistoko?

- Mi estas el Rusio, el fora oriento. Mia urbo estas Ĥabarovsko. Mi estas esperantisto kaj okupiĝis pri tio.

Do konkrete pri kio?

- Mi estis asistanto de Esperanto-instruisto. Ni kune faris kelkajn kursojn. Mi ankaŭ laboris en la biblioteko kun kolekto de Esperanto-libroj ĉe la strato Warszawska. Krome mi partoprenis en pluraj Esperanto-aranĝoj, ne nur en Bjalistoko. Mi helpis organizi ilin.

De kiam vi estas en Pollando?

- De ok monatoj, sed mia restado ĵus finiĝis kaj mi revenas hejmen.

Kaj kio plej plaĉis al vi? En Pollando, en Bjalistoko?

- Pollando tre plaĉis al mi. Podlaĥio, kulture diversa. Mi sentis min bone ĉi tie. Por mi Pollando estas Eŭropo, kaj mi ĉiam revis troviĝi en Eŭropo. Mi estas feliĉa ĉi tie kaj volas ankoraŭ reveni.

Kaj kio ne plaĉis al vi? Ĉu vi renkontis ekz. malbonan traktadon, diskriminacion?

- Antaŭ ol iri al Pollando mi havis antaŭtimon. Iam la avino diris al mi, ke poloj ne tro ŝatas rusojn. En mia okazo tio montriĝis malvero. Eble iam estis tiel, sed nun estas tute malsame. Mi ne renkontis malbonan traktadon, tute male, mi ĉiam trovis bonan akceptadon.

Vi bone parolas la polan, kie vi lernis la lingvon?

- Neniam antaŭe mi lernis ĝin. Nur kiam mi ekestis en Pollando. Mi aŭskultis, penis paroli. Monaton post monato mi ĉiam pli multe komprenis kaj lernis. Mi ne estas tre diligenta lernanto, ĉar multon mi devas ankoraŭ lerni por pli bone paroli la polan.

Kaj viaj revoj, planoj por la proksima estonteco?

- Nun mi revenas al Ĥabarovsko. Mi serĉos laboron, vizitos amikojn, vidos, kio ŝanĝiĝis en mia urbo. Verdire mi revas reveni al Pollando.

Dankon pro la interparolo kaj sukceson je realigado de la revoj. Ĝis revido en Bjalistoko.

Interparolis: S. Dobrowolski; la intervjuo ne estis aŭtorizita.

www.espero.bialystok.pl

Pri Esperanto en interreto

Bjalistoka Esperanto-Societo elkore invitas viziti la retpaĝon. En ĝi bjalistokaj esperantistoj regule publikigas informojn pri plej interesaj eventoj rilataj al Esperanto en la urbo kaj la regiono. Tie oni povas trovi ankaŭ interalie tekstojn pri la historio de la Esperanto-movado kaj ĝiaj plej elstaraj reprezentantoj, informojn pri la Esperanto-itinero kaj liston de projektoj, en kiuj partoprenas la asocio. Grava parto de la retpaĝo estas Google-kalendaro, kiun ĉiu povas aboni – danke al ĝi en via poŝtelefono aperos memorigoj pri venontaj Esperanto-eventoj. La adreso de la retpaĝo estas **www.espero.bialystok.pl**

P. Wierzbowski